




# Komencanto



*Kiu vi estas?*

Bildon sendis Luiza Izmajlova [Kuzneck, Rusio]

**internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj**

marto  
- aprilo

konata franca E-instruisto kaj tradukisto Johan'-Luko Tortel rakontas pri sia esperantistiĝo – amuza rakonto “La tualetto de la kato”  
verkoj de niaj legantoj – gramatikaj lecionoj de J-L Tortel  
- diversaj ondoj el bunta mondo – aforismoj, ŝercoj, anekdotoj  
- impresoj kaj sperto: pri la 5-a Azia E-kongreso – korespondu!



(70)

## Perantoj de "Komencanto"

Ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian revuon

**UEA** - Universala Esperanto-Asocio,  
Nicuwe Binnenweg 176, 3015 BJ, Rotterdam, Nederlando

**Argentino** Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910  
- Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

**Aŭstralio** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson  
St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio** Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000,  
Antwerpen

**Brazilo** Brazilia Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasilia  
(DF) - BR - 70084-970

**Britio** David Kelso, 5 Craighenhill Road, Carlisle, ML8 4QT

**Ĉeĥio** Vladislav Hasala, A.Dvorčka 1, CZ-696 62 Strážnice

**Ĉinio** Ĉina Esperanto-Ligo, PO Kesto 825, CN-100037,

Beijing

**Danio** Revuservo de Dana Esperanto-Asocio. Arne Casper,  
Bryggervangen 70, 4.tv. DK 2100 Kopenhago.

**Estonio** Virve Ernits, Villimaa 17 — 8, EE 93812, Kuresaare.

**Finnlando** Paivi Saarinen, Esperanto-Asocio de Finnlando  
Siltäsaarenkatu 15 C 65, FI-00530 Helsinki

**Francio** Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie,  
75004, Paris.

**Germanio** Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse,  
9 D-55129 Mainz.

**Hispanio** Pablo Vicente Valero, adv, Obispo Quesada  
n=BA14, 6D, ES-40006, Segovia.

**Irano** Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184,  
TEHRAN

**Italio** Itala Esperanto-Federacio, Via Villoresi, 38, 20143,  
Milano.

**Italio, Kroatio, Slovenio** Višnja Branković

Via Leghissa 6, IT-34131, Trieste

**Irlando** Esperanto-Asocio de Irlando, 9 Templeogue Wood,  
Dublin 6W

**Japanio** Japana Esperanto-Instituto, JP-162-0042, Tokyo-to,  
Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3

**Katalunio** Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290,  
ES-08200, Sabadell

**Kubo** Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa  
11300, Havano

**Litovio** Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas,  
ab.k. 167.

**Norvegio** Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18,  
N-0572 Oslo

**Nov-Zelando** David Dewar, 4 Harlech Mews,  
Christchurch 8004

**Pollando** Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137,  
PL-01-865 Warszawa

**Portugallio** Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. Joao Couto,  
N.6, R/C.-A, 1500 Lisboa

**Svedio** SEF, Lisbet Andreasson, Kajsa Kavats gata 8,  
SE-242 35, Horby

**Svislando** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6,  
CH—4224 Nenzlingen

**Usono** Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129,  
El Cerrito, California 94530, U.S.A.

Karaj legantoj!

Espereble ke vin nun ĝojigas varma spiro de la printempo kaj mem vi plenpulme enspiras la freŝan aeron, plenan de printempaj odoroj kaj aromoj de novaperintaj sur arboj verdaj folietoj kaj unuaj printempaj floroj. Povas okazi, ke la bildoj de vekiginta naturo kaj renoviganta vivo ĉirkaŭe, kreos apartan agrablan humoron ĉe vi, portos la inspiron, vekos deziron ion verki. Tiam ne hezitu provi kaj nepre sendu viajn provojn al redakcio de "Komencanto"!

Kaj sur la paĝoj de tiu ĉi numero vi povos legi kelkajn jam publikigitajn verkojn de la legantoj, kiuj, ŝajne, ankaŭ aperis rezulte de printempa influo. Legu poeziprovojn de Lenke Szasz el Rumanio kaj Nikolaj Neĉajev el Rusio, lirikan rakonteton "Mati" de Maks Martin kaj tradukaĵojn "Grandanimeco" de Lenke Szasz kaj "Ĉu vi memoras pri la antaŭ-tuko de la avino?" de Martin Ginette el Francio.

Ĉi-foje vi, karaj legantoj, havas ŝancon konatiĝi pli proksime kun la konstanta, dum la lastaj kelkaj jaroj, aŭtoro de nia gramatika rubriko — Johan'-Luko Tortel. Historio de lia esperantistiĝo tute ne similas al la aliaj. Ekde la infanaĝo kaj dum la dua mondmilito li estis devigita multe sperti komunikadon per diversaj lingvoj kaj ironie rimarkas en sia rakonto, ke "al lingvaj diferencoj kaj al la ricevo de Esperanto" lin "preparis la milito mem". Multe vidinte kaj spertinte, li asertas tute konvinkinte, ke Esperanto estas perfektaĵo, kiam temas pri komunikado inter diversnaciuloj.

Krome, apud la rakonto pri la esperantistiĝo, kiel kutime vi trovos la verkojn de la prezentata en la rubriko persono. Ĉi tie vin distros la amuzaj tradukaĵoj de J-L Tortel. Kaj sur la gramatika paĝo vin atendas lia vica prigramatika "babilado". Espereble, la lernado per gramatikaj lecionoj de Johan'-Luko Tortel estas ĝuo kaj ĝojo por vi!

Por la novlanĉita rubriko "Simboloj de landoj kaj kulturoj" ĉi foje kontribuas per la rakonto pri finnaj saŭnoj jam konata al vi Pyhäälä Raita el Finnlando. Ni petas ĉiujn legantojn pli aktive kontribui por tiu ĉi parto de la revuo!

En "La praktiko" vi povas tralegi materialon, kiun sendis el Japanio Micuko Itabaŝi kaj kie ŝi rakontis pri sia sperto de la partopreno en 5-a Azia E-kongreso kaj priskribis siajn impresojn kaj pensojn pri la evento.

Kompilante tiun ĉi numeron de "K" ni penis, ke ĝia enhavo aldonu al vi, karaj, pozitivajn emociojn, kaj ĝojos, se ni sukcesos en tio!

*la redakcio*

# Komencanto

2008 numero 2 // (70) regule aperas ekde 1998

redaktis la numeron Raja Kudrjavceva

enpaĝigis Andrej Parfentjev

Poŝta adreso: 620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Rusio

retpoŝto: [komencanto@r66.ru](mailto:komencanto@r66.ru)

abontarifo por 2008

internacia tarifo: 18 eŭroj

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo: 15 eŭroj;

aerpoŝta aldono 2 eŭroj

konto ĉe UEA: [vkud-a](#)

rusia tarifo: 200 rusiaj rubloj.

Кудрявцев Виктор Васильевич 620041, Екатеринбург, аб. яш. 132.

## Kiel tio komenciĝis

Johan'-Luko Tortel

Johan'-Luko Tortel — konata E-instruisto, gvidanto de multaj E-kursoj – skribaj, pervortaj, perretaj – kaj staĝoj en Greziljono, Bureso. Multe tradukas kaj verkas originale. Reverkis kaj editoris *La Cours Rationnel d'Esperanto* de SAT-Amikaro; tradukis el la franca (kaj faris lemolibron el ĝi): *La Leciono de Ionesco*; el la itala: *Senso de C. Boito*; el la okcitana: *La Besto de Vakareso de J. d'Arbaud*; regule tradukas *La Diroj*, de la filozofa Alain por la gazeto "Laŭte". J-L Tortel estas aŭtoro de "Gramatikaj lecionoj" surbaze de la analizo de Zamenhofaj proverboj, kiujn legantoj de "Komencanto" povas utile kaj plezure legi.


## ... De tiam, mia opinio estas senapelacia: Esperanto? — perfektaĵo!

Mi naskiĝis inter ambaŭ mond-militoj en Sud-franca vilaĝeto. Ĉiuj loĝantoj ĉirkaŭ mi estis du-lingvaj, inter si parolante nur la nun preskaŭ malaperintan okcitanan-provencan "dialekton", kaj uzante la francan nur por legi gazeton aŭ aŭskulti radion. Mi do iĝis tute nature dulingva. Sed mi baldaŭ, ve! devis konstati, ke la lingvoj ne limiĝas al tiuj du!

Venis la dua mond-milito, kaj kiam mi ekvizitadis la mez-gradan lernejon en la najbara urbeto Oranĝo, mi devis eklerni la klasikajn grekan kaj latinan, kaj la anglan, kiu malgraŭ ties tiam-a malpli-a valoreco konservis sian rangon pro la inercio de la eduk-sistemo. Rapide oni devis lerni duan "vivantan" lingvon. Ni ĉiuj elektis la italan, ĉar tiun oni povis lerni nur en la knabina "kolegio"! Krome tio donis al ni la eblecon babili kun la okupantaj Italaj soldatoj, tre afablaj kaj parolemaj junuloj en verda uniformo. Ili defilis kurante! portis karabenojn kun stranga subfald-ebla bajoneto, facile kaj bele kantis, kaj tuj montris la fotojn de la familianoj: "*Ecco la mamma!*" (Jen panjo). Iliaj elegantaj oficiroj pli-batigis junulinajn korojn per siaj vastaj verdaj pelerinoj kaj siaj plum-havaj ĉapeletoj.

Sed la maljuna instruisto malaperis pro malsano, kaj oni klarigis al ni, ke pro manko de alia instruisto de la itala ni devas eklerni la germanan! Ĝuste samtempe la Itala armeo lasis lokon al la Germanoj, mem-ŝataj, nebabilemaj kaj rigardantaj la okupaciitajn civil-ulojn "kun altaj okuloj", kiel diras *La Psalmaro*. Mi ankoraŭ en la oreloj havas la bruon de iliaj botoj sur la Oranĝaj trotuaroj. Ili nur iom "humaniĝis" por peti per sia iom raŭka akcento: "*Ŝatonef ti pap! ŝatonef ti pap!*" tio estis la vojo al Chateaneuf du Pape, fama loka vinvilaĝo!

Sed turniĝas la rado de Fortuno, kaj du jarojn poste, deko da tiuj orgojl-uloj, mem milit-kaptitoj, laboris en la vilaĝo al purigado de la vojoj, helpado al ŝafo-bredado aŭ arbara ligno-kolekto, kaj estis kontentaj pri mia vespera vizito por ŝak-ludi kaj babili en la germana lingvo. Tio multe instruis min, precipe pri vortoj, kiujn oni ne pri-parolas en lernejo! Germane "kaskedo" kaj "virina organo" diferenc-iĝas nur per la gramatika genro; mi hipokrite unu fojon intence eraris pri tio, kiam mi devis en-klase paroli; sed nia instruistino de la germana tute ne reagis je mia "eraro" kaj konservis sian kviet-econ antaŭ mia knab-aĉ-eco.



Poste la Usona kaj la Franca Nordafrika armeoj liberigis Provencon. Oranĝo pleniĝis de Usonaj soldatoj, mirindaj pro sia pli sportista ol militista sinteno, sia dis-donemo de frand-aĵoj forgesitaj de jaroj (oranĝoj, ĉokolado...) kaj siaj silentaj ŝu-pland-umoj el kaŭĉuko!

La angla de tiuj novuloj estis la plej malfacile komprenebla el ĉiuj spertitaj lingvoj; ni aŭdis nur la akcentitan silabon; kiam ĝi estis la unua, la tuto de la cetera vorto malaperis en ia bru-nebulo. Ili haltigis antaŭ ni siajn strangajn aŭtetojn por krii: "*Girls! girls!*" Ni fieris en-aŭt-iĝi — aŭ pli ĝuste suraŭt-iĝi — sur tiujn ĵipojn kaj konduki ilin al... la urba bordelo, kaj rekompense ricevi cigaredojn kaj nekonitajn frandaĵojn (kiel maĉo-gumon) de la ĵipa gardanto, senpacience atendanta la eliron de siaj kamaradoj por siavice sin ĵeti internen kaj sin-prem-iĝi ĉe virino, kiu kun egala indiferenteco antaŭ kelkaj semajnoj sen-pezigis la Germanojn.

Kelkfoje ili tie renkontis alt-staturajn silent-ulojn, kun ost-eca bruna vizaĝo, aglaj okuloj, tut-razita kranio, kun surkap-aĵo simila al ronda pan-krono, kun monak-aspekta longa griza kapuĉ-hava robo, ĉe kies zono pendis glave longa bajoneto, al kies anso mi iam vidis unu fulmo-rapide etendi la manon ĉe ek-disputo, kio tuj mirakle mild-igis la Usonan kontraŭantan gigant-ulon!

— Marokaj partizan-soldatoj de la Franca armeo — iam mal-ŝate klarigis al mi iu Nord-afrika laboristo — Berberaj montaraj duon-sovaĝ-uloj! ili eĉ ne parolas arabe! (Oni ĉiam trovas iun malestimota, ĉar pli subklasa ol si!)

Ironie do min vekis al la lingvaj diferencoj kaj min preparis al la ricevo de Esperanto la milito mem.

Sed la decida ŝoko venis kelkajn jarojn poste. Mia patro kaj mi vizitis lian amikon en apuda vilaĝo. Ni vidis ekstere de lia domo biciklon, ne-kred-eble ŝarĝitan de ĉia-specaj poŝoj kaj sakoj, kaj interne ni vidis lin flue babili kun ne-konat-ulo en nekonata lingvo.

— Jen mia korespondanto — li diris — Finland-ano bicikle tra-iranta Eŭropon.

— Sed ĉu vi parolas lian lingvon? — miregis mia patro.

— Ne, per Esperanto ni inter-parolas!

La sekvon mi ne bezonas klarigi, ĉu ne? Mi aliĝis al unu el la plej malnovaj E-kluboj, tiu de Romans, iama Franca ĉef-urbo pri ŝu-farado, nun mortanta pro tutmonda konkurenco. Post kelkaj monatoj la klubo vizitis trans la Alpa montaro la E-klubon de la Itala Torino; mi antaŭ-pensis: "Mi iomete lernis la italan; mi ne havos malfacilon". Je mia surpriz-ego, mi nur uzis E-on kaj tute inter-kompren-iĝis kun la Torinaj samideanoj, multe pli facile, ol per la duon-lernita itala. Tuj poste mi partoprenis TEJO-kongreson en Konstanco, Germanujo. De tiam, mia opinio estas sen-apelacia: Esperanto? — perfekt-aĵo!

Nun mi konfesu ion. Dum jaroj kaj jaroj la subtilaĵoj de la Esperanta gramatiko tedis min; mi flue sed fuŝe parolis, aldonante vorton post vorto, en tuta indiferento al akuzativo, refleksivo, predikativo... kaj aliaj komencanto-turmentiloj. Oni pli-malpli komprenis min;

do kial ĝen-iĝi?

Sed en Parizo mi havis la ŝancon kelk-foje partopreni la Esperantan kabaredon de Schwartz kaj la ĉiutomonatan manĝon de la loka elito: Waringhien, Laurat, Thierry, Bernard... Iun tagon Roger Bernard afable prenis min aparte ĉe la kubuto, kaj flustris al mia orelo:

— Vi ja estas brav-ulo, knabo; sed kiam do vi eklernos Esperanton?

Tio estis bato; mi subite hontis, tiom pli, ke ĝentile neniu ion similan jam diris al mi!

Mi tiam sentis, ke mia senzorg-emo estis ia mal-estimo al miaj samideanoj, ia malestimo al mia admirata Zamenhof, kiu poluris sian subtil-aĵon, privilegiante precizecon kontraŭ facileco.

Mi serioze ek-re-lernis, petante de Thierry kaj Waringhien, ambaŭ ĉiam afable pretaj respondi, oftajn klarigojn, komprenis la profundecon de nia Esperanto, kaj ĝiajn ekster-ordinarajn kvalitojn, kiujn mi antaŭe tute preter-pasis. Mi ankaŭ konstatis, ke E-o suferas ne-kontent-igan instruadon, havas tro banalajn lernolibrojn, tro et-nivelajn kursojn.

Mi do decidis parte dediĉi la mallongan reston de mia vivo al tiu tre malfacila, preskaŭ ne-ating-ebla tasko: kiel eble plej bone klarigi la funkciadon de tiu inter-ligilo mirinda: Esperanto, "*nostro lengo mespresado*", nia lingvo mal-estimata, kiel okcitane diris la Nobel-premiito Frederiko Mistral pri sia propra okcitana lingvo, kiu restas, kiel Esperanto, ankaŭ kara al mia koro.

Ĉi –sube vi povas legi la tradukverkojn de J-L-Tortel, kiuj prezentas lin kiel tre kreeman personon.

# La tualetto de la kato

adaptita el Marcel Aymi

Johan'-Luko Tortel [Francio]

Vespere, revene de la kampoj, la ge-patroj trovis la katon sur la bordo de la puto, kie ĝi faris sian tualeton.

— Nu, ili diris, jen la kato frotas sian oreton. Denove pluvos morgaŭ.

Ja morgaŭ pluvis la tutan tagon. Ne eblis iri en kampojn por labori. La gepatroj estis en ĉagreno kaj koler-ema al siaj du fil-inoj. Delfino, la pli aĝa, kaj Marinjo, la pli blonda, lud-adis en la kuir-ejo je ekflug-anta kolombo, je ost-etoj, je pend-um-ito, je "lupo-kie-vi?".

— Nun grandaj, ili tamen ĉiam ludas, ĉiam amuz-iĝas, grumblis la gepatroj. Eĉ kiam dek-jaraj, ili ankoraŭ ludos, anstataŭ kudri, aŭ skribi al onklo Alfredo.

Poste ili turnis sin al la kato, kiu de la fenestro rigard-adis la pluvon.

— Ankaŭ ĉi tiu kat-aĉo ne multe laboras dum unu tago. Tamen multaj musoj kuras de la kelo al la sub-tegmento. Sed tiu sinjoro preferas sen-page manĝi, ol labori!

— Vi ĉiam grumblas, respondis la kato. Tage mi dormas aŭ ludas. Ja nokte mi tra-kuras la subtegmenton, sed vi ne ĉe-estas por danki min.


— Nu, vi ĉiam volas pravi, vi mal-vigla!

Ĉe la fino de la tago la pluvo plu fal-adis. Dum la gepatroj laboris en la best-ejo, la knab-inoj ek-ludis ĉirkaŭ la tablo.

— Ne ĉirkaŭ la tablo, diris la kato. Vi rompos ion, kaj la gepatroj kolere krios.

— Nu, se ni aŭskultus vin, ni neniam ludus, respondis Delfino.





Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

— Ja vere, plu-diris Marinjo, se aŭskulti Alfonson (tio estis la kata nomo) ni pas-igus nian tutan tempon en dorm-ado.

Kaj ili plu kuris ĉirkaŭ la tablo. Sur ĝi staris plado el fajenco cent jarojn aĝa. La gepatroj tre ŝatis ĝin. Dum rond-iro, Delfino kaj Marinjo tiris piedon de la tablo kaj la plado el bela fajenco falis plank-en en multaj pecoj. La kato eĉ ne turnis la kapon, sed la knabinoj tuj haltis kaj sentis siajn orelojn tre varmaj.

— Alfonso, kion fari?

— Iru ĵeti la pecojn en la foston; la gepatroj eble nenion rimarkos. Ha! tro malfrue; jen ili re-venas.

La gepatroj tiel koleris, ke ili salt-adis kiel puloj, kaj ke la kato for-kuris.

— Knabin-aĉoj! pladon en la familio jam de cent jaroj vi rompis! en pecojn! vi monstroj! Jen la puno: sen ludo kaj sen manĝo, krom mal-mola pano!

Ili eĉ trovis la punon tro milda:

— Krome, ha! ha! se morgaŭ ne pluvos, ha! ha! vi vizitos onkl-inon Melino!

Delfino kaj Marinjo tute palaj kun-igis la manojn en pet-ego.

— Vane vi pet-egas! se morgaŭ ne pluvos, vi portos pot-eton da konfit-aĵo al onkl-ino Melino.

Tiu estis tre mal-juna kaj tre mal-bona vir-ino, kun buŝo sen-denta kaj mentono plena je barbo, kiu erinac-e pikis ĉe kis-ado. Krome ŝi pinĉis la vangojn kaj tiris la harojn de la knabinoj. Ŝi dev-igis ilin manĝi mal-novan fromaĝon kun ŝimo; ripetis, ke ili multe similas ŝin kaj ke ĉe la fino de la jaro ili estos ŝia plena portreto; ja terura penso!

— La ĉielo viŝas sin, kontente diris la gepatroj. Nu, sufiĉe da plor-ado! Tio ne gluos la pladon. Iru do al la lign-ejo kaj revenu kun ligno.

Tie ili trovis la katon. Je la miro de Delfino, Marinjo rid-eme demandis Alfonson:

— Ĉu vi bon-volas helpi nin por ne iri al onklino Melino?

— Bedaŭr-inde mi ne kapablos konvinki la gepatrojn.

Sed Marinjo insistis:

— Ili ja diris: se ne pluvos, vi vizitos onklinon Melino.

— Nu?

— Facile: frotu vian oreton; tiel morgaŭ pluvos!

— Ho! Bon-ege! mi ne pensis pri tio.

Kaj ĝi tuj komencis, kaj frotis la oreton pli ol dek fojojn.

Dum la vespera manĝo la gepatroj multe parolis pri onklino Melino; ili jam preparis la poton da konfit-aĵo. La knabin-etoj mal-facile kaŝis sian rid-emon.

Ĉe la en-lit-iĝo la gepatroj rigardis tra la fenestro:

— Kia bela nokto! Oni vidas ĉiujn stelojn; morgaŭ agrable estos sur-voje paŝ-adi.

Sed morgaŭ la ĉielo estis griza kaj la pluvo frue ek-falis. Diris la gepatroj:

— Tio ne gravas, tio ne daŭros.

Kaj ili vestis la knabin-etojn per dimanĉa robo kun roza banto sur la har-aro. Sed la pluvo ne ĉesis dum la tuta tago. Tamen la gepatroj restis en bona humoro:


— Al onklino Melino morgaŭ vi iros; la ĉielo jam hel-iĝas; ni estas en majo, tiu pluvo ne daŭros.

La vesperon la kato multe tualetis, kaj la morgaŭo denove estis pluva. Ne eblis sendi la knabinojn al onklino Melino. La gepatroj komencis mal-bone humori. Ili grumblis pro la puno vana kaj ankaŭ pro sia dev-iga hejma rest-ado sen laboro sur la kampoj. Ili akre koleris kontraŭ la knabinetoj, kaj ilia ĉagreno sin turnis al la kato:

— Vi mal-labor-ema! vi sen-utila!

Kaj ili batis ĝin per la bala-ilo. La kato for-fuĝis venĝ-ema. Sen tiu bat-ado, ĝi rapide lasus re-veni la belan veteron, ĉar katoj ŝatas grimpi arbojn kaj tra-kuri

Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]



ĝardenojn kaj heĝojn. Sed ĝi konservis tiel malbonan re-memoron de la balailo, ke la knabinetoj ne bezonis peti pluvon: dum tagoj kaj tagoj sen-ĉese pluv-adis kaj pluv-adis. La kolero de la gepatroj ankoraŭ kreskis. Ili ne povis kolekt-adi sur la kampoj, kaj la plantoj tie ek-putris. Ili forgesis la pladon, la onklinon Melino, sed komencis suspekti la katon. De tempo al tempo ili sekrete flustr-adis unu al alia.

Iun pluvan matenon, Delfino kaj Marinjo post sia el-lit-iĝo trovis ilin en la kuirejo; ili jam metis sur la tablon mal-plenan grandan tolan sakon, fortikan ŝnuron kaj dikan ŝtonon. Tiam eniris la kato.

— Alfonso, jen bona lakto en la taso apud la fajro, afable diris la gepatroj.



Bildon sendis Nadeĵda Loĵkina [Glazov, Rusio]

— Mi dankas, vi ja tre bon-koras, respondis la kato, kiu ne kutimis tian afabl-econ. Dum ĝi trankvile trinkis, la gepatroj ek-prenis ĝin, kaptis ĝiajn krurojn, ĵetis ĝin kun la kapo antaŭa en la sakon, en kiun ili jam metis la pezan ŝtonon, kaj firme nodis la ŝnuron.

— Kion vi faras, gepatroj? ĉu frenezaj, vi? ek-kriis la kato.

— Ni ne estas frenezaj; ni male komprenis la fi-farojn de kato, kiu en ĉiu vespero tualetas. Sufiĉe da pluvo ni ricevis! Akvon vi ŝatas, akvon vi havos: post kvin minutoj vi kuŝos en la fundo de la rivero.

La knabinoj kri-egis, ke ili ne lasos dron-igi la katon; la gepatroj kriegis, ke ĝi meritas nur tion; Alfonso miaŭ-egis kaj freneze skrapis la internon de la sako.

Subite la gepatroj re-memoris, ke ili devas rapidi al la stacio por sendi per vagono plurajn sakojn da ter-pomoj.

— Ni nun ne plu havas tempon al la rivero. Ni iros post nia reveno. Se vi malfermos la sakon, ni sendos vin por ĉiam al onklino Melino.

Tuj post ilia foriro Delfino kaj Marinjo mal-nodis la ŝnuron. La kato montris la kapon:

— Knabinetoj, vi havas koron el oro! Sed mi preferas droni, ol perdi vin por ĉiam al onklino Melino.

— Nepre ne! Ŝi ne estas tiel malica; ni preferas vivi kun ŝi, ol kaŭzi vian dronigon.

Sed Alfonso volis nenion aŭskulti, kaj re-ŝov-iĝis en la sakon. Dum Delfino vane provis persvadi ĝin, Marinjo iris peti la konsilon de maljuna anaso, kiu amuzis sin sub la pluvego en akvo-lag-eto. Por pli bone pri-pensi, ĝi kaŝis sian kapon sub sian flugilon. Post momento ĝi diris:

— Metu ŝtipon de sama pezo kiel Alfonso en la sakon.

— Sed la gepatroj ja vidis, ke ĝi ne mov-iĝas!

— Alfonso nur kaptu kelkajn musetojn kaj ŝovu ilin en la sakon kun la ŝtupo. Ili moviĝos, kaj la gepatroj pensos, ke la kato movas la krurojn. Sed ne forgesu fari trueton en la fundo, ke la musoj eskapu ĵus antaŭ la ĵeto en la akvon.

Tion oni febre faris, kvankam estis malfacile al Alfonso kapti musojn, ĉar ĝi vere estis mal-vigla kato, kaj ne ŝatis post-kuri ilin.

Fine oni aŭdis la alvenon de la gepatra kamion-eto, kaj ĉio okazis, kiel prepar-ite.

Dume oni decidis, ke la kato eterne kaŝos sin dum la tuta tago en la subtegmento kaj eliros nur nokte. Delfino diris:

— Ni ĉiu-nokte akceptos vin kaj preparos al vi lakton kaj rest-aĵojn de manĝo.

Re-ven-inte, la gepatroj trovis la knabinojn kant-antajn.

— Vere la morto de tiu kompat-inda Alfonso ne multe afliktas vin! Ĝi ja estis ne malbona kato, nur iom malvigla. Ĝi meritis pli fidelajn amik-inojn.

— Ni sentas grandan aflikton, diris Marinjo; sed nun ĝi mortis, finita afero.

— Kaj fine ĝi tion meritis, plu-diris Delfino.

— Vi sen-koraj infanoj! grumblis la gepatroj. Vi preskaŭ meritis viziton al onklino Melino.

Oni al-tabl-iĝis, sed la gepatroj estis tiel mal-gajaj, ke ili preskaŭ nenion prenis, dum la knabinetoj plej apetite manĝis.

— Aflikto ne for-prenas vian manĝ-emon! Se Alfonso vidus vin, ĝi sciis, kiuj estis liaj veraj amikoj!

Kaj ĉe la fino de la manĝo la gepatroj ne povis de-teni siajn larmojn kaj ek-ploris en sian naz-tukon.

— Nu, gepatroj, iom da kuraĝo, diris la knabinetoj. Alfonso vi pelis en sakon, sven-igis per baston-bato kaj dron-igis en la riveron; sed tio estis por la bono de ni ĉiuj. Ĉesu plori; kiam vi for-iris al la rivero vi estis firmaj en via decido!

La morgaŭon la ĉielo estis hela, la kamp-aro sun-plena; la gepatroj iris labori kaj mal-pli multe pensis pri sia kato. La sekv-antaj tagoj la vetero ankoraŭ pli belis, la kampoj bezonis ankoraŭ pli da laboro, kaj la gepatroj baldaŭ tute forgesis la aferon.

Ankaŭ la knabinoj, kiuj ĉiu-nokte ricevis la viziton de Alfonso, ne sentis la bezonon paroli pri ĝi.

Iun vesperon la koko, raport-ema fi-ulo, diris al la gepatroj reven-antaj el la kampoj:

— Ŝajnas al mi, ke mi ĉi-nokte vidis Alfonson en la korto.

— Tiu koko estas freneza, grumblis la gepatroj unu al la alia, kaj ili preter-iris.

La morgaŭon la koko re-parolis al ili:

— Se Alfonso ne estus funde de la rivero, mi ĵurus, ke mi hodiaŭ vidis ĝin ludi kun la knabinoj dum via kampa laboro.

— Tiu pli kaj pli frenezas, pensis la gepatroj. Kaj ili subite atente rigard-adis ĝin.

— Ĝi havas ja frenezan kapon, sed belan korpon. Freneza koko senutilas por averti pri okaz-ajoj, sed bel-korpa koko estas interesa, ĉu ne?

Kaj la morgaŭon ili kuiris ĝin, kaj ĉiuj trovis ĝin tre bon-gusta.

Jam de tri semajnoj Alfonson oni kredis morta, kaj la vetero senĉese belis. Falis eĉ ne unu guto da pluvo. Post kvar semajnoj la tero estis tiel seka, ke neniu herbo plu kreskis. Tritiko, sekalo, aveno sek-iĝis ankoraŭ ne-maturaj. La gepatroj estis en granda timo, kaj akre bedaŭris la mal-aperon de la kato. Ili akuzis la knabinojn:

— Ankoraŭ unu tia semajno, kaj ĉio rost-iĝos. Kial vi diabl-ece romp-is tiun pladon? Sen tiu far-aĉo via, ni ne havus problemon kun la kato, kaj ĝi ĉe-estus por helpi nin!

Iun matenon, la knabinoj tro longe dormis en la lito, kaj la gepatroj venis vek-i lin. Ili vidis, ke la kovrilo havas tuberon; el sub la kovrilo, oni povis vidi pinton de vosto. La gepatroj mal-kovris, kaj en mir-ego re-konis Alfonson. La knabinoj devis rakonti la veron.

— Ni antaŭ-vidis la sek-econ. Pro tio ni savis Alfonson!

Sed la gepatroj koleris:

— Vi mal-obeis! Vi vizitos onklinon Melino!

Kiam la kato Alfonso aŭdis tion, ĝi saltis al la fenestro kaj diris:

— Se estas tiel, mi mem tuj foriros al onkline Melino, kaj ĵuras, ke mi neniam plu revenos!

Tiam la gepatroj sur-genue pet-egis la katon, ke ĝi restu por eterne en la hejmo, kaj nepre reven-igu la pluvon. Alfonso re-saltis al la tablo, sid-iĝis, etendis sian voston kaj komencis tre longan tualet-adon kun homoj kaj bestoj ĉirkaŭe. Ĝi frotis sin de malantaŭ la oreloj ĝis la lip-haroj ambaŭ-flanke de la kapo pli ol dudek fojojn. La morgaŭon kaj dum pluraj tagoj pluv-egis kaj la tuta kamparo re-nask-iĝis.

Ĉar feliĉo neniam venas sola, la leter-portisto al-venis kun letero. Kiel kutime, li atendis la leg-adon de la gepatroj, antaŭ ol foriri.

— Ha! diris la patro; onkline Melino razis sian mentonon, kaj sekve trovis vidvon kiel edzon! Ili post la ge-edz-iĝo foriros por vivi kune tre malproksimen, en fremdan landon!

— Kio do estas vidvo? diris la knabinoj, demand-ante sin, ĉu ili devas danki aŭ kompati lin.


*Jen konata, verŝajne al multaj, fabelo,  
kiun elfrancigis **Johan'-Luko***

## La cikado kaj la formiko

Post beltempa plenkantad'  
La cikad'

Tre mizeris en malsato  
Sub la vintra ventobato  
Sen vermet' aŭ muŝa pec'  
Por englut' el ajna spec'.  
Ĝi sin trenis mangalmoza  
Al formiko senripoza  
Petegante humiltone  
Kelkan grenon pruntedone

Ĝis venonta novprintemp'.  
"Mi repagos post la temp'  
De l' rikolto, fidu min,  
Laŭ procenta plejkulmin'."  
Ne malŝparas la formiko,  
Ĉi malsaĝon ĝi rifuzas.  
"Kiel vi someron uzas?"  
Ĝi respondis al amiko.  
"Tage, nokte, plenlibere  
Mi kantadas ĉe la voj'.  
— Vi kantadas! kia ĝoj'!"  
Do nun dancu vivespere!"



Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

Emil Garleanu 1878-1914

El la rumana tradukis **Lenke Szasz** [Praid, Rumanio]

## Grandanimeco

Je mateniĝo, sur la marĉo, la lumo faras miraklojn. Surface de la akvo aperas lumbriloj, ie briletas speguleroj - oraj trezoroj inter la kanoj. Ankaŭ sur nufaroj, kvazaŭ sur naĝantaj kalikoj, preterfluas oraj radioj. Arĝenta polvo donas brilon al la kanaro. Ĉie estas silento senmova, paradiza.

La ardeo vekigiĝis je mateniĝo. Li eniris en la marĉon. Sur la longaj, maldikaj piedoj, kiel tigoj, lia korpo malrapide balanciĝas. Foj-foje li metas en akvon sian bekon; kelkfoje li ekhaltas por rigardi exploreme en la fundon de la akvo, kvazaŭ li trovis tie ion delonge serĉatan. Estis malvarmete kaj la malvarmeto ravis lin. Li sentas nenian alian deziron, ol bani siajn piedojn en la malvarma ondo, kiu sendas frostotremetojn ĝis sub liaj flugiloj.

Subite li ekhaltas, streĉas sian kolon kaj rigardas. Sur la folio de nufaro sidas raneto kaj ankaŭ ĝuas la belecon kaj freŝecon de la dimanĉo. Ekvidinte la ardeon, kompatinda raneto rigidiĝis sur la malantaŭaj piedetoj kaj per grandaj malfermitaj okuloj rigardas al la kruela malamiko. Pro la timeco la raneto vidas lin grandega, kun kapo atinganta la ĉielon, kun beko longa, larĝa, kapabla ensuĉi per unu gluto la marĉon kaj kune kun la marĉo la raneton. La koro de la raneto ekhaltis.

La aredeo vidas kaj komprenas la raneton. Sed matene li estas grandanima. Krome, tiom malgranda, tiom signifiĝa ŝajnas ĉi tiu estaĵo de la marĉo, ke dum iu tempo li kvazaŭ preterrigardas en la fundon de la akvo kaj eĉ ne plu vidas la raneton. Li eklevas la piedon, ekpaŝas malestime kaj fiere pluiras.

La raneto ne povas kredi, ankoraŭ starante tiel kelkajn sekundojn, poste, pro ĝojo, eksaltas sur alian folion; kaj pro impeto de dankemo, la unua, rompas la silenton de la mateno:

—Kvaak!



**Lenke Szasz** [Praid, Rumanio]

### Kara estas...

Maljuna saliko riverborde staras.  
Tuta ĝia trunko interne jam kavas.  
Printempe kreskigis tamen etan branĉon -  
Ĝi instruas al mi la naturan saĝon:  
Eĉ se proksimiĝas jam viv' al la fino,  
Kara estas ĉiu tago de la vivo.

*Kiel kutime nia tradicia rubriko prezentas diversajn provojn: tradukverkojn kaj originalaĵojn, poemojn kaj prozaĵojn, sed ili ĉiuj kunportas printempan optimismon kaj ŝerceman aŭ lirikan humoron.*

Bildon sendis **Rinat Hismatulin** [Novotroick, Rusio]



**Nikolao Neĉajev** [Irkutsk, Rusio]

### Latitudoj

Al hejmlanda latitudo  
Venis varm' el fora sudo.  
Logis l' cerbon al konkludo:  
Ree trilos kanta ludo  
post tre longa vintra krudo!

Ĉu al via latitudo  
Venis vent' kun maj-aludo?



Maks Martin [Rusio]

## Mati

Fin-fine la suno brilis printempe. Stas zorgeme palpebrumis al ĝi. La ĉirkaŭanta lin malvasta provincurbeta mondo ne plu montriĝis fremda, enuiga kaj morna. Nun tiu ĉi mondo, kien li trafis ne laŭ la propra volo – kio estas ja evidenta – sed, male, spite al ĝi, pleniĝis je iu senco, kaj je iu bolanta nehaste, iu aparta, sed nun ankaŭ lia, Stas'a, vivo. Denun lian vivon plenisgi Mati. Ŝi ankoraŭ ne sciis pri tio, ke plenisgi lian vivon. Kiam ŝi flirtis tie, en la halo, kun nekonata juna viro, enuanta en provinco, mistera eksa loĝanto de ĉefurbo, ŝi faris tion aŭtomate – bela juna virino, majesta, ŝvebanta super la vanta ĉiutageco. Post la stulta bablado kun ŝi pri rosmaroj, Stas subite ekvidis antaŭ si simple virinon – fajnan, malfortan, pri kiu li ege volis zorgi. Certe ŝi ankoraŭ ne sciis, ke meritas lian zorgon. Kaj li ne volis trudi sin, por li dume tute sufiĉis la konscio, ke li povas defendi tiun delikatan fajnan belon de ĉiutageca grizo. En lia vivo aperis ŝi – La Princino – kiu ne sciis ankoraŭ, ke ŝi estas Princino, sed apenaŭ ŝia scio ŝanĝus lian al ŝi rilaton, lian nunan novan vivon.

Komencanta aŭtoro por “Komencanto”



## Ĉu vi memoras pri la antaŭ-tuko de la avino?

teksto de nekonata aŭtoro, tradukis el la franca **Ginette Martin** [Soulxures/Moselotte, Francio]

La ĉefa utilo de la antaŭ-tuko de Avinjo estis ŝirmado de la suba robo, sed plie, ĝi utilis kiel ganto por eltiri la brul-varmegan paton el la forno.

Ĝi estis mirinda ilo por viŝi la larmojn de la infanoj kaj, kelkokaze, purigi la malpurajn vizaĝetojn.

La antaŭ-tuko utilis por de la kokinejo transporti ovojn, revivigotajn kokidojn, kaj kelkfoje fenditajn ovojn.

Kiam vizitanto venis, la antaŭ-tuko utilis por kaŝi timemajn infanojn, kaj en kazo de malvarma vetero, Avinjo volvis ĝin ĉirkaŭ siajn brakojn.

Tiu bona malnova antaŭ-tuko rolis kiel blovilo, svingata super la ligno-fajro. Estas ĝi, kiu transportis terpomojn kaj lignon ĝis la kuirejo.

De la legom-ĝardeno, ĝi utilis kiel korbo por multaj legomoj. Post kiam la pizoj estis rikoltitaj, venis vico por brasikoj.

Somerfine, ĝi utilis por kolekti falintajn pomojn.

Kiam vizitanto venis senaverte, estis surprize vidi, kiel rapide tiu malnova antaŭ-tuko povis viŝi polvon.

Je la horo de manĝo, Avinjo iris kaj svingis ĉe la pordo per la antaŭ-tuko, kaj la viroj surkampe sciis, ke ili povis veni ĉetabliĝi.

Avinjo ankaŭ uzis ĝin por transporti la pomo-torton, apenaŭ eltiritan el la forno, ĝis la fenestro-breto, por ke ĝi malvarmiĝu, dum niatempe la nepino metas ĝin en la saman lokon por degeli.

Necesos tre multaj jaroj antaŭ ol iu inventos objekton, kiu povos anstataŭi tiun bonan malnovan antaŭ-tukon, kiu utilis al tiom da aferoj.


Solomin Dmitrij [Ivdel, Rusio]



Karaj legantoj, jam tradicie ni proponas al vi plibonigi viajn sciojn de *E-gramatiko per vica sprita leciono!*

**Johan' Luko Tortel** [ Le Belvedere, Francio ]

## Babilado 17



*Saluton!*

### Ĉiu mano al si altiras (259)

Ni tion bone komprenas: ni deziras akiri ĉion akir-eblan.

Sed tiu fraz-eto en-kondukas la pronomon SI kaj ties deriv-aĵojn (SIN, SIA, SIAN, SIAJ, SIAJN). Tio kelk-foje ŝajnas mal-facila -al ni, komenc-antoj.

Unue ni lernis, ke ĝi neniam povas esti subjekto.

Ni re-memoru: en frazo estas ago (la verbo); poste tiu, kiu faras la agon: la subjekto; kaj la komplementoj, kiuj komplet-igas la agon.

Neniam SI por subjekto, — bone; sed kial? Ĉu oni tion klar-igis al ni? Nu, la klarigo estas simpla: oni ne bezonas ĝin por subjekto, tute simple, ĉar oni jam havas por tio LI, ŜI, ĜI, ILI — pronomoj de la " tria " persono, kiel oni diras.

Ĝuste nur la " tria-persono " havas apartan pronomon por propra mem-komplemento. Sed kial, diable?

Ni eble ne rimarkis, ke la tria persono estas tre stranga; jen: kiam mi diras:

Mi amas min, neniŭ dubas pri la ama-to, estas mi;

Vi amas vin, neniŭ dubas pri VIN; sed se SI ne ekzistus, oni ne sciŭs fari diferencon inter Petro amas Petron — mem li amas sin, kaj Petro amas Paŭlon — li amas lin.

La unua (mi) kaj dua (vi) personoj aŭtomate re-sendis al la subjekto; sed por la tria, ni devis preciz-igi. Jen kial ekzistas SI.

Ni profitu la aferon por ripeti, ke:

- SI kaj ties deriv-aĵoj neniam estas subjektoj (neniam faras la agon);
- do ili nur aperas komplemente;
- tiam aŭtomate re-sendas al la subjekto;
- ekzistas nur ĉe la tria persono; Slav-lingvanoj memoru, ke oni ne diru en Esperanto : \*Mi aĉetis sian domon (\* indikas eraron) sed mi aĉetis mian domon. (Cetere tio ne propras al Slavaj lingvoj; oni trovas ankaŭ tion en la Okcitana).
- SI resendas al la subjekto de la laste esprimita ago.

Kelkaj ekzemploj el nia kara Proverbaro:

### Li bruligis al SI la lipharojn (1316)

do Petro bruligis al Petro la lipharojn; sed se Petro bruligis al Paŭlo la lipharojn, ni devas diri: li bruligis al LI la lipharojn.

### Enbati al si en la kapon (479)

Jozefo nepre devas lerni, do li devas nepre en-meti la aferon en SIAN kapon ; se li devus enŝovi ĝin en la kapon de la infano Klara, oni dirus:

Enbati en Li en la kapon

Trovu la konvenan :

### Kiu ...in gardas, tiu ...in savas (1102)?

Se Petro gardas Paŭlon: Kiu lin gardas, tiu lin savas; se Petro gardas Petron mem: kiu sin..., tiu sin...

**Brava homo en ...ia domo (199)** ĉu Petro en la domo de Petro mem? do: en sia... ; ĉu Petro en la domo de Ludoviko? do: en lia...

Ni finu per kelkaj sufiksoj :

### Singardeman Dio gardas (2428) :

-EM- indikas inklinon al... aŭ kapablon al...

### Tuso kaj amo ne estas kaŝeblaj (2490)

-EBL- signifas, ke io povas esti farata

### Al feliĉulo eĉ koko donas ovojn (26)!

AL montras la direkton, la celon, la proksim-igĝon ; -UL- indikas personon, laŭ lia ĉefa eco: ĝibo, ĝibulo; riĉo, riĉulo; juna, junulo...

Se nia koko ne donas al ni ovojn, la spirito de nia Zamenhof almenaŭ donu al ni emon kaj eblecon iĝi kuraĝuloj en nia lernado!

*Ĝis!*

*Karaj legantoj! Jen estas la nova materialo por la novlanĉita rubriko "Simboloj de landoj". Ĉi – foje aŭtorino el Finnlando rakontas pri konata al ĉiu finnaĵo – saŭnoj.*

**Pyhällä Raita** [Lestijärvi, Finnlando]

## Saŭnoj - ĉu finnaĵo?

La majoritato de finnaj familioj posedas saŭnon, kelkaj eĉ plurajn, kaj tiuj, kiuj ne posedas, frekventas komunan saŭnon de la apartamentaro kie ili loĝas, de siaj geamikoj aŭ, kelkokaze, publikan saŭnon. (Publikaj saŭnoj tamen preskaŭ malaperis en la fino de la 20a j.c.) Finnlando kaj saŭno iĝis neseppureblaj, kaj la finna vorto "sauna" estis alproprigiita de aliaj lingvoj.

### Nunaj saŭnoj

Nunaj saŭnoj estas lignaj ŝvitejoj, kiujn oni hejtas aŭ per elektro aŭ per brulligno en fajrejo. Apude situas duŝejo kaj eta loko por malvestiĝo, bantukoj kaj banmanteloj. Super la hejtilo kuŝas amaso da ŝtonoj, kiuj dum la hejtado fariĝas tiel varmegaj, ke akvo ĵetata sur ilin tuj vaporigigas kaj en la saŭno senteblos kvazaŭ plia varmego. La temperaturo de la saŭno varias de 60 ĝis 100 gradoj, laŭ la deziro de la sinbanatoj, kiuj sidas aŭ kuŝas nudaj sur benko aŭ "balkono" proksime al la plafono.

Kiom longe la saŭnumantoj restas en la ŝvitejo, dependas de ilia propra elekto. Unuj restas tie nur dekon da minutoj, aliaj duonhoron aŭ pli, multaj ŝatas reveni en la varmegon post sinduŝado aŭ plonĝado en malvarmeta akvo. Ne malmultaj batadas sin per betulbranĉaj faskoj, trinkas sukon aŭ bieron dum la paŭzoj. Kutimaj saŭnotagoj estas sabato kaj merkredo. Post la saŭnado oni ŝatas rosti kolbasetojn, somere subĉiele, vintre ĉe senpordega endoma fajrejo. Oni babilas, ŝercas, bierumas, kafumas, ripozas.

### Ĉu geviroj kune?

Jes, tio eblas inter familianoj aŭ bonaj geamikoj, sed kutime viroj kaj virinoj saŭnumas aparte. Saŭno estas loko ne tre luma, kie oni malstreĉiĝas, silentas, kondutas trankvile kaj kviete, lavas la dorson de la kunsauŭnanto, se tiu tion deziras. Ekde beboiĝo oni tie kutimiĝas al nudeco. Troveblas tiom da manieroj saŭnumi kiom da uzantoj de la saŭno, sed prefere forlasu alkoholaĵojn kaj seksajn imagaĵojn.

### Saŭno, sano kaj festoj

Kelkaj homoj evitas saŭnumadon pro kormalsanoj, alta sangopremo, migreno aŭ tro seka haŭto. Multe pli da homoj diras, ke la saŭno ne nur tenas nin sanaj kaj puraj, sed kreas festan antaŭetoson. Tre gravaj por ni estas ekzemple "joulusauna" (la 24an de decembro) kaj "juhannussauna" (antaŭ la 24a de junio).

### Diversaj saŭnoj

Ĉiu kiu ŝatas saŭnumi havas sian opinion pri "ideala saŭno". Oni ankaŭ ludeme provas diversajn saŭnojn en malkutimaj lokoj: en tendo, sur boato, en saŭnokamiono, sub la tero, en neĝosaŭno... La plej fama kaj amata estas fumosaŭno sur la bordo de akvo, duonkaŝata de betuloj, konstruita kiel oni ilin konstruis antaŭ cent aŭ pli da jaroj. Ĝia hejtado daŭras 5-6 horojn, kaj estas peze alporti la bezonotan akvon, sed la posta plezuro estas des pli ĝuinda.

La vorto saŭno supozeble devenas de samea ("lapona") lingvo, kie "saun" signifas tertruon. La unuaj saŭnoj estis nur kavoj kun malaltaj trabomuroj tegmentitaj per torfo, betulŝelo, maldikaj trunketoj. Tiaj duone subteraj saŭnoj estis kutimaj ĝis la 20a jarcento. Iom post iom estiĝis pli komfortaj modeloj.

En okcidenta Finnlando la saŭno situas nur 10-20 metrojn de la loĝdomo kaj estis ofte uzata por fari malton, fumaji viandon, sekigi linon. Kiel banejon oni uzis ĝin 1-2 foje en semajno. En orienta kaj norda Finnlando la saŭno estis ĉefe banejo, kiun oni somere hejtis ĉiuvespere. Oni konstruis ĝin pli fore de la loĝdomo, ĉe fonto, puto aŭ alia loko, de kie oni povis porti akvon al la saŭno.



La akvo estis varmigata en kaldronego, kiu situas en la saŭna ŝvitejo aŭ en aparta lavejo. Ĉie saŭnoj estis uzataj ankaŭ kiel naskejoj kaj kuracejoj (kupado, masaĝado, kuraca ŝmirado, eble kun magiaj kuracvortoj). Ju pli foren en la pasinteco oni esploras, des pli da ligoj kun prereligio oni trovas en la saŭnotradicio. En la saŭno vivis feo, la saŭnokoboldo, pri kiu oni ankoraŭ nun fabelas. La finna vorto "luuly" (vaporo kaj varmo) origine signifis spiriton.

### Kial finnoj ŝatas saŭnumi

La kutimo purigi sin mense kaj korpe devenas de pratempo. Prafinnoj unue konstruis por si saŭnon, la loĝdomon nur poste. En malvarma klimato la eblo ŝviti kaj lavi sin per varma akvo estis necesa kaj alte taksata. Ankaŭ nun saŭnumado rekuraĝigas homojn kaj donas al ili esperon kaj fidon en la vivon. Ili vidas sian homan nudecon, veran identecon, kutime kaŝitan de vestaĵoj, kaj tio pliproksimigas ilin, igas ilin pli komprenemaj kaj sociemaj. En la saŭno oni rajtas tute liberigi de zorgoj kaj devoj. En la saŭno oni ne kverelu, ne ĉikanu, ne ofendu. Saŭnumado kun amik(in)oj kaj magiaĵoj estis pratempa antaŭ-geedziĝa rito, kiun oni ankoraŭ povas praktiki, ekzemple en la originaj saŭnoj de subĉiela muzeo dediĉita al la malnova saŭnokulturo.

### Eble tamen ne nur finna fenomeno?

Jam en la jaro 1110 monaĥo Nestor el Kieva monaĥejo kronikis pri saŭnoj en la ĉirkaŭaĵo de Ladoga-lago. Ŝejko Ibn Dasta en 912 konatiĝis kun mordvaj saŭnoj en la nuna moskva regiono. Indiĝenoj - indianoj - en Nord-Ameriko uzis t.n. ŝvitetendon. Tamen finnoj obstine asertas, ke saŭno estas finnaĵo, eble ĉar finnoj pli multe uzas ĝin ol alilandanoj. Saŭnumado kaj persistemo - jen du ec-eroj de finneco.



# Aforismoj, anekdotoj, humuraĵoj...



El kolekto de **Viktor Sapoĵnikov** [Jalutorovsk, Rusio]

## Saĝaj pensoj

- Ĉu necesas serĉi sian lokon en la vivo, se estas bone sur la fremda?
- Homo ĉiam trovas tempon por ĝin perdi
- Se oni cedis vojon al junularo, tio signifas, ke laŭ ĝi jam delonge neniu marŝas.
- Estas *pri kio* pensi, ne estas *per kio*.
- Se aferoj moviĝas malbone, do, ili moviĝu pli rapide.
- Neniam diskutu kun stultuloj – homoj povas ne rimarki diferencon inter vi.
- Se ĉion kompreni tiel, kiel ĝi estas – multo iĝas nekomprenebla.
- Nenio alia tiel proksimigas la homojn, kiel samtempe dirita stultaĵo.
- Se al vi neniu envias, demandu vin - ĉu vi vere vivas?
- Demokratio: pensu, kion vi volas, sed faru, kion oni ordonas.
- Malutilaj herboj kreskas ne ĉie, sed nur tie, kie oni ilin ne bezonas.
- La propra opinio pli bone konserviĝas, se oni tenas ĝin ĉe si.
- Se vi deziras, ke la edzino estu anĝelo, organizu por ŝi paradizon.
- Kiel facile estas konstante pensi pri la aliaj – kiam vi pensas pri ili nur malbonon.
- Se vi estas pli saĝa ol ĉiuj, kiu komprenos tion?!
- Kio estas pli malfacila – prezenti la fremdan personon kiel la propran, aŭ la propran kiel la fremdan.
- *Fortuno* pli ofte ridetas al tiuj, kiujn ne rimarkas *Femido*.
- Mono estas ju pli granda malbono, des pli malmulte vi ĝin havas.
- Ve! – la kvanto da jaroj ne transformiĝas en kvaliton!

- Superavideco – li eĉ el du malbonoj elektis la plej grandan.
- La homoj ĉiam imagas pri si mem ion neordinaran, sed de la vidpunkto de kokoj ili estas ordinaraĵoj kokinaj-manĝantoj.
- Kiam oni legas antikvajn saĝulojn, ofte renkontas ion propran, ĉu ne?
- La vivo alte taksas tiujn, kiuj alte taksas la vivon.



Ŝulepov Aleksandr [Verhoturje, Rusio]

Ŝparu tempon – legu aforismojn!

Anekdotoj el kolekto de  
**Paĥomov Sergej** [Kirov, Rusio]

Juna, graveda programistino  
ploregas, ŝin insultas la patrino:  
— Kiel do vi permesis?  
— Li promesis iĝi registrita  
uzanto-o-o-o !!!..

\*

En Usono oni indignas pri la  
filmo “Reĝo de l’Ringoĵ”. Laŭ  
reguloj de “politika ĝentileco” el  
kvar *hobitoj* unu devas esti afro-  
usonano, la dua – aziano, kaj la  
tria – virino.

\*

Dum arkeologiaj esploroj en  
indiĝena vilaĝo de Suda  
Ameriko estis trovita ora  
statueto de

**Ketĉalminoknuganjkoatlkte-  
notĉetlano**, la Dio de memoro  
kaj bona prononco.

\*

— Ĉu vian kapon vizitas pensoj  
pri seksumado ?

— Hm, vizitas... Ili tie loĝas !!!

\*

Por kio necesas rabi bankon, se  
eblas ĝin fondi ?

**Viktor Sapoĵnikov** [Jalutorovsk, Rusio]

Homo venas al horloĝriparisto  
kaj montras horloĝmontrilojn.  
— Sed kie estas la horloĝo mem?  
— Por kio la horloĝo? Ĝi estas  
en la ordo. Jen, la montriloj ne  
moviĝas...

\*\*

— Se vi havus 100.000 rublojn,  
kion vi kun ili farus?  
— Disdonus ŝuldojn.  
— Kaj kun la restintaj?  
— Kaj la restintaj atendu plu.

Studentino venas ekzameniĝi pri  
literaturo. Ekzamenisto:

— Familio, nomo...

— Se mi malsukcese  
ekzameniĝos – tiam Anna  
Karenina...

\*\*

En la nova jarmilo homoj ne plu  
mensogos, ŝtelos, mortigos...  
Ĉion tion anstataŭ homoj faros  
komputiloj.

\*\*

Viro en granda vendejo sinturnas  
al virino:

— Pardonu, mia edzino ie  
perdiĝis. Ĉu vi ne povus doni al  
mi iom da atento...

— Por kio?

— Vidu, kara, kiam mi parolas  
kun bela virino tuj momente  
aperas mia edzino.

\*\*

— Hej, stevardino!

— Kion vi volas?

— Donu al mi notlibron por  
plendoj! Ĉiufoje, kiam mi flugas  
per tiu ĉi aviadilkompanio oni  
donas al mi la saman lokon. Kaj  
mi ne povas spekti filmon. Kaj  
sur la fenestroj mankas kurtenoj,  
tial mi ne povas dormeti...

— Ĉesu, kapitano, kaj ne  
deflankiĝu de la stirado de la  
aviadilo - baldaŭ alteriĝo.

Sendis **Kuznecov Sergej** [Kamiŝev, Rusio]

Ĉefo al dungito:

— Vi jam la kvinan tagon  
malfruas al la laborejo. Kion mi  
devas konkludi?

— Ke hodiaŭ estas vendredo.

\*\*

Profesoro al studento:

— Sed vi nenion scias...

— Ne, profesoro, mi ja scias...

— Tiam vi tre lerte scias kaŝi viajn  
sciojn...

\*\*

Familio vespermanĝas. Filino  
volas ion diri al la patrino.

— Dum manĝado oni ne parolas, -  
rigore instruas filinon la patrino.  
Post la vespermanĝo la patrino  
demandas :

— Nu, kion vi volis diri?

— Mi volis diri, ke vi forgesis  
enŝaltitan gladilon sur ĉemizo de  
la patro.

\*\*

Oldulo ĉe la kuracisto:

— S-ro kuracisto, mia piedo  
doloras...

Kuracisto:

— Nu, via aĝo jam estas tia...

La oldulo:

— Sed la dua piedo ja ne doloras,  
tamen ĝi ne malpli aĝas ol la  
unua...



**Luiza Izmajlova** [Kuzneck, Rusio]



*Nia legantino el Japanio Micuko Itabaŝi februare partoprenis gravan E-aranĝon – 5-an Azian Kongreson de Esperanto kaj rakontis al ni pri siaj impresoj kaj akirita praktika sperto dum ĝi.*

Ĝi okazis inter la 11a kaj 15a de februaro en Bengalujo, Barato, varma (temperature kaj kore) lando. Feliĉe mi povis partoreni en ĝi kaj havis multege da impresoj kaj spertoj. Kaj mi volas priskribi al vi kelkajn aferojn.

Aziaj landoj estas diversaj kaj okupas vastan teritorion. Ĝi estas de Papua Nova Gvineo ĝis orientaj regionoj de Rusio. En azia E-movado aliĝintaj asocioj kaj individuoj jam estas 25. Sed necesas diri ke disvastigi nian lingvon ne estas facile. Oni scias, ke edukado donas al homoj pli bonan vivnivelon, sed en aziaj landoj ekzistas homoj, kiuj pro malriĉeco ne povas ricevi edukon eĉ en sia nacia lingvo. Tamen eĉ en tiu situacio kelkaj aktivuloj de E-movado klopodis disvastigi nian lingvon.

La 5a Azia Kongreso de Esperanto aspektis kvazaŭ universala pro diversnaciaj partoprenatoj. La aliĝkotozino inkluzivis bankedon, lunĉojn kaj eĉ teojn. La organizantoj metis en la programon tupaŭzojn antaŭ- kaj post-tagmeze. Por tio estis disponigita subtegmeta korto kaj klimatizita ĉambro. Kongresanoj laŭ sia plaĉo kunvenis tie kaj sidis babilante.

En tiu simpatia atmosfero mi konatiĝis kun unu virino, komencantino, kiu lernis Esperanton per la reto nur antaŭ kvar tagoj. Ŝi partoprenis en la kongreso kun siaj edzo kaj gefiloj nur post kvartaga lernado! Ŝi tenis paperojn en la mano kaj kiam ŝi aŭdis novajn vortojn, tuj notis ilin sur la paperon por poste serĉi ilin en la vortaro. Dum la unua renkontiĝo tiuj familianoj balbutis kaj estis iom hezitemaj. Sed post du tagoj ili jam pli libere parolis kun mi. Ni povas opinii, ke interreto ŝanĝas nian medion. Kiam ni utiligos ĝin pli aktive kaj vaste, ni havos grandajn rezultojn. Pri tio ni devas kune cerbumi.

Mi montros al vi aliĝintojn laŭ landa statistiko. Kelkaj el ili ne povis partopreni pro iuj problemoj, sed estas mirinde, ke venis esperantistoj el 30 landoj.

## Pri 5a Azia Kongreso de Esperanto

### Listo de la partoprenintoj

Aŭstralio	3
Bangladeŝo	1
Belgio	1
Barato	35
Brazilo	1
Britio	4
Ĉinio	16
Francio	2
Germanio	4
Hispanio	1
Irano	8
Israelo	1
Japanio	86
Koreio	10
Latvio	2
Luksenburgio	2
Mongolio	1
Nederlando	1
Nepalo	28
Pakistano	10
Pollando	2
Ŝrilanko	7
Svedujo	1
Svislando	1
Taĝikio	3
Tajvano	1
Usono	4
Vejtnamio	1
SUME	240

Estis raportoj de KAEM (Komisiono de UEA pri Azia Esperanto-Movado). Inter ili min tre interesis la sperto, rakontanta pri la organizado de E-kurso en Filipinoj. Oni diskutis kiel helpi aŭ subteni tiun kurson. Dum la diskutoj sonis ankaŭ konklude, ke se multaj etaj kongresoj okazos en aziaj landoj, tio certe helpus la lokan movadon.

Venonta kongreso okazos en Ulanbatoro, Mongolio.

Estis interesa propono de esperantisto el Taĝikio okazigi la 7an kongreson, post kvar jaroj, en Duŝanbe (Taĝiko) aŭ en Samarkando (Uzbekio). Ilia problemoj estas en tio, ke esperantistoj tute ne vizitas Taĝikion. Ĝi estas montara lando, 90 procentojn de ĝia teritorio okupas montoj kaj nur 10% estas valoj. Krom tio ne estas turismaj oportunaĵoj. Kiam eksterlandaj esperantistoj vizitos la landon, ili havos ŝancon popularigi nian lingvon inter la popolo. En Uzbekio estas eminentaj kaj aktivaj esperantistoj. Krom tio Samarkando estas bone konata turisma loko. Kune kun uzbekaj esperantistoj la taĝikaj samideanoj certe povos okazigi Azian Kongreson.

La partopreno en la kongreso enpensis min pri nia E-movado, Barato kaj baratanoj. Fine mi povas diri, ke kongresoj donas reciproke utilon – kiel por kongresloko, tiel ankaŭ por partoprenantoj.



Bill Thorne [Anglio]

*Mi estas 75-jara emerita instruisto, mi volas korespondi tra la tuta mondo. Miaj interesoj estas legado kaj interesaj homoj.*

**Camilien Lauzier**

Boisbriand

**Kanado**

kam2rous@videotron.ca

\*\*\*

*Mi estas studento de filozofio en Skotlando. Mi tre ŝatus havi ŝancon ekkoni aliajn junajn geesperantistojn kaj skribi al ili. Mi ŝatas danci "Macarena". Aliaj interesoj - filozofio, kuiri, lingvoj, legi, kino - ĉio en la tuta mondo estas interesa!*

**Thom Curtis**

Edinburgo

**Britio**

t.m.curtis@sms.ed.ac.uk

\*\*\*

*Mi estas 21 jara komencanto, kiu studas en universitato por esti inĝeniero kaj loĝas en norda regiono de Hispanio. Mi volas interŝanĝi pensojn, sciojn pri kulturoj. Kaj mi kolektas monerojn kaj monbiletojn de aliaj landoj. Ankaŭ mi ŝatas sanon, sporton. Precipe mi deziras korespondi kun samideanoj, kiuj loĝas en insuloj aŭ en landoj de Eŭropa Unio. Mi deziras paper-korespondi, ĉar mi ne havas ret-konekton. Via aĝo ne gravas, nek via sekso aŭ kulturo.*

**Jesús Saiz de Omenaca Tijero**

Urb. Universidad Número 24

39110 Soto de la Marina

Cantabria

**Hispanio**

<http://www.alumnos.unican.es/uc28689/Esperranto.htm>

\*\*\*

*21 jara studento, komencanto, kiu studas en la universitato de Antananarivo, en la sciencia fakultato. Mi estas malagaso. Mi deziras korespondi kun japanaj, usonanaj, malagasaj, aŭstraliaj kaj francaj gejunuloj. Mi ŝatas legi librojn, ludi gitaron, promeni kun miaj geamikoj, rigardi filmojn kaj aŭskulti muzikon.*

**Andriamihaja Charly**

Lot IIA 119 RB Nanisana

MG 101 Antananarivo

**Madagascar**

Dapouni@yahoo.fr

\*\*\*

*Mi estas 19-jara studentino en La Universitato de Ekonomia Administrado en Wuhan. Mi loĝas en studenta domo de la universitato. Mi ŝatas la folkloran arton de Ĉinio. Koscie kaj persiste daŭre mi lernas Esperanton.*

**Kristala Chen Jing**

Wuhan, Hubei,

**Ĉinio.**

chenjing87152001@yahoo.com.cn

\*\*\*

*61 jara viro, sufiĉe Esperanto-kapabla, lingvo-instruisto. Int: naturo, kulturo, lingvoj. Mi tre ŝatas labori en mia kampo kaj vojaĝi al belaj pejzaĝoj. Mi volas korespondi retpoŝte kun komunikemaj homoj, kaj legi multe en Esperanto. Mi loĝas en Ok-cidenta Germanio.*

**Claus Winterhoff**

Düsseldorf,

**Germanio.**

verdastelo@t-online.de

\*\*\*

*21 jara viro, komencanto, kiu studas psikologion ĉe la Universitato de Romo. Int: politiko, psikologio, kulturo kaj religio. Mi korespondos paper-poŝte kaj ret-poŝte.*

**Valentino Coletta**

via Perugia, 38

04011 Aprilia LT

**Italio**

valentino.coletta@fastwebnet.it

\*\*\*

*26 jara viro, agronomia inĝeniero, deziras korespondi paper-poŝte kaj ret-poŝte.*

**Guillermo Bes Salazar**

Calle 2 # 74 1/2 entre Gasómetro y 9.

Mariana de la Torre. CP: 90200.

Santiago de Cuba,

**Kubo**

guillermo@cies.ciges.inf.cu

\*\*\*



Timur Halilov [Jekaterinburg, Rusio]

*Mi estas 39 jara, edziĝita viro. Mia profesio estas akustika kunlaboristo. Interesoj: lingvoj, komputiloj, scienco, biciklado kaj (Azia, precipe Indonezia) kuirarto. Mi korespondos paper-poŝte kaj ret-poŝte. Langedijk estas vilaĝo 45 kilometroj norde de Amsterdamo.*

**Bert Klijn**

Klipper 119

1721 GW Broek op Langedijk

**Nederlando**

bertmarjan@hotmail.com

\*\*\*

*19 jara junulino, komencantino, kiu studas por esti ĵurnalistino. Mi ŝatas novajn homojn, kiuj havas diversajn interesojn. Mi ŝatas esti en centro de eventoj. Sed de tempo al tempo mi volas silenton kaj solecon por pensadi kaj revii... Miaj ŝatokupoj estas teatro, muziko (klasika kaj rok'), ĉevalrajdo, legado de libroj. Mi ŝatas promenadon en la naturo kaj pasigi tempon kun miaj geamikoj. Mi preferas paper-poŝton, tio estas iom romantike, ĉu ne? Mi loĝas en Siberio, apud belega lago Bajkal, plej profunda lago sur la Tero!*

**Julia Solovjova**

14, str. Medicinskaja,

u. Ulan-Ude, Burjatio,

RU-670047 Rusio

s\_g@inbox.ru

\*\*\*

*Mi estas 32 jara komputilisto, mi havas edzinon kaj filon. Int.: fotado, biciklado, ŝamanismo. Ula-Ude situas apud mirinda lago Bajkal.*

**Oleg Glushko**

Ulan-Ude

**Rusio**

legy@zmail.ru

\*\*\*

*Mi estas 46 jara virino, mez-nivela esperantistino. Interesoj: kulturo, lingvoj, vojaĝoj, literaturo, arto, moroj kaj kutimoj, kuirarto, joko. Mi serĉas samgeneraciajn korespondantojn. Kioto estas 400 kilometrojn okcidente de Tokio.*


**Etsuko Nakazawa**

Kioto,

**Japanio.**



ccuko@mui.biglobe.nc.jp

**J-L. Tortel** – konata E-instruisto, kiu ne nur sindone laboras por Esperanto, gvidante plurajn E-kursojn kaj E-staĝojn en Greziljono, Bureso, sed ankaŭ multege tradukas kaj verkas originale. Vi povas vidi ĉi tie fotojn de la kovriloj de kelkaj liaj libroj, jam eldonitaj. Ilin eblas ankaŭ mendi ĉe UEA kaj SAT.



***Cours Rationnel d' Esperanto*** — lernolibro por franclingvanoj (agnoskata kiel la plej kompleta en tiu lingvo) senĉese reeldonata de SAT-Amikaro en Parizo de ĉirkaŭ okdek jaroj. J-L. Tortel reverkis kaj editoris ĝian novan eldonon.

***Senso*** — fama romano de la itala verkisto Camillo Boito pri terura venĝo de virino, kiu krom sian malfidelan amanton abomeninde trafas plurajn senkulpulojn. Ĝi inspiris tri filmojn, la plej faman el Visconti (eld. Kava-Pech, akirebla ĉe UEA & SAT).



***La Besto de Vakareso*** — unu el la plej famaj okcitanaj verkoj. Novelo pri izolulo, vivanta en la duonsovaĝa marĉregiono de Kamargo (delto de Rodano), bredante ĉevalaron kaj bovaron, kiu iun tagon renkontas estaĵon duone homan duone sorĉistan, el kiu li lernas kaŝitajn misterojn (eld. Kava-Pech; akirebla ĉe UEA & SAT).